

Prezentado

Post la dua mondmilito, Verkoro interesiĝas pri similaĵoj kaj diferencoj inter homoj kaj bestoj, aparte la parto de besteco en la Homo kaj de homeco en la besto.

Li rakontas dum intervjuo¹, kiel la milito influis lin pri tiu temo: "Mi ne sciis – tiam ankoraŭ ne – kio, ekzakte, estas la eco de homo. Antaŭ la milito, mi intuicie formis certan ideon pri la homoj kaj esprimis ĝin en miaj gravuraĵoj, tre pesimistaj kiel vi scias. Sed la famaj "sub-homoj" de la nazia ideologio trudis min, pro la abomeno de la konsekvencoj, ĉion reekzameni kaj precize: Kio estas Homo? Kio difinas ĝin? Mi jam rakontis al vi, kiel mi kredis respondi (al mi) dank' al Kant kaj lia "Fundamento pri la metafiziko de la etiko". Sed se, konsekvence, la ĉefaj aspektoj de la naziismo estis implicite kondamnitaj, oni ne povis trovi en ĝi, difinon de la Homo-en-si-mem".

La libro "La eksternaturaj animaloj" (*Les animaux dénaturés*), de kiu devenas la teatraĵo "Zoo aŭ la filantropa murdinto" (*Zoo ou l'assassin philanthrope*) aperis en 1952. Ĝi komenciĝas per tiu pseŭdo-citaĵo de D.M. Templomoro, la ĉefa protagonisto de la libro, mote :

"Ĉiuj niaj malfeliĉoj devenas de tio, ke la homoj ne scias kion ili estas kaj ne akordiĝas pri kio ili volas esti" (Pli aŭ malpli bestoj)²

« *Tous nos malheurs proviennent de ce que les hommes ne savent pas ce qu'ils sont, et ne s'accordent pas sur ce qu'ils veulent être* » (*Plus ou moins bêtes*).

Tiu Templomoro intence mortigis estaĵon, kruciĝaĵo de homo kaj tropio, nove malkovrita speco de homedoj vivantaj en Nov-Gvineo. Ĉu li devas esti juĝita pro murdo de homo? Ĉu la tropio estas homo aŭ ne? Tion devas esti tranĉita per proceso.

Jen estas la fundamenta problemo kiun Verkoro deziras eksponi: ĉu oni povas fiksi la limon inter la homo kaj la besto? Ekde kiam oni povas deklari, ke iu besto kiu dividas plurajn trajtojn kun homo apartenas al la homaro?

Verkoro unue instalas la debaton sur scienca tereno, li entreprenas kompilaĵon de diversaj sciencaj argumentoj (Inter-fekundiĝo kun homo, anatomio, fari fajron, tajli ŝtonojn, rido, parolo, samseksamo, ...) kaj detale prezentas ilin per disputo inter spertuloj dum la proceso. Sed tiu disputo ne sukcesis lumigi la ĵurianojn.

Laŭ Verkoro, la malfacileco kuŝas en tio ke oni ne povas kontentiĝi nek per unu objektiva trajto eĉ nek per nur unu grupo de trajtoj (fizikaj, lingvistikaj, kulturaj...).

Fizikaj (anatomiaj) aŭ kulturaj trajtoj ne sufiĉas ĉar ili estas bazitaj sur jam malkovritaj fosilioj. Jarpostjare oni malkovras novajn homenajn fosiliojn per paleontologiaj serĉadoj. Tiuj novaj fosilioj dividas trajtojn kun konataj specoj sed ankaŭ prezentas novajn apartajn trajtojn. Scienculoj pene devas ĉiufoje determini ĉu ili estas kuzoj de homo aŭ prahomoj.

Konstatante ke ne eblas difini homon surbaze de sciencaj studoj, Verkoro proponas unue difini la Homeco, antaŭ la Homo: estos Homo ĉiu kiu elmontras Homecon. En la tradicio de la klerismo, post J.J.Rousseau kaj E.Kant, li konceptas la econ de homo ne en aro de trajtoj sed dinamike en teniĝo, en mensostato, per lia kapablo ĉiame ribeli kontraŭ tio kion la naturo altrudas al ĝi. Oni

¹ Por diri la veron. (*A dire vrai : entretiens de Vercors avec Gilles Plazy, Paris, F.Bourin, 1991, p. 121-122*)

² La titolo de la fantazia libro estas alaŭdo al antaŭa libro de Verkoro "Pli aŭ malpli homo" (*Plus ou moins homme*).

povas rimarki ke laŭ tiu difino, besto sed ankaŭ ankoraŭ ne malkovrita ekster-tera estaĵo, eble fizike malproksima de homo, povas esti inkludita en la homaro. Kompreneble, Verkoro ne neas la parton de besto en la homo, li pensas ke por homoj iĝi homa estas ĉiama lukto por eliri el la naturo, el la besteco, kun progresoj kaj malprogresoj.

Tiu problemo ne estas nur teoria. En tiu teksto, Verkoro ekzamenas diversajn praktikajn implicojn de iu decido pri tiu problemo.

Rilate al ekonomia vidpunkto, fiksi tiun limon estas tre grava: nehomaj estaĵoj povas esti traktitaj kiel bestoj, kiuj ne ricevas salajrojn, kiuj ne povas streki, kiujn oni povas manĝi kiam, post vivo de laboro, ili mortas. Unuvorte, ili ne rajtas pri la homaj rajtoj.

Sed ankaŭ rilate al rasismo gravas tiu problemo. En la verko "P.P.C" (Por Adiaŭi), per kiu li publikigas sian rompon kun la komunistoj, li inkludas la antaŭparolon kaj postparolon al la Sovetia kaj pola eldonaĵo de "La eksternaturaj animaloj". La kritikoj konsideras ke rasisto povus tiri argumenton el lia libro kiu favoras lian rasistan tezon: la unueco de la homa familio ne ekzistas, nur ekzistas skalo de homedoj, al pinto de kiu estas la blanka homo, unika vera homo. Li respondas ke la neesto de preciza zoologia limo inter la simioj kaj la homedoj, kaj inter la homedoj kaj la homoj ne kreas hierarkion sed diversecon.

Li publikigis plurajn tekstojn rilate al tiu problemo:

- 1950: Plus ou moins homme
- 1952: Les animaux dénaturés
- 1963 : Zoo
- 1961: Sylva
- 1973: Questions sur la vie (Demandoj pri la vivo)

Ankoraŭ pri najbara temo, en 1990, li tradukis kun sia dua edzino Rita Barisse la anglan libron "*What We Did to Father*" (Kion ni faris al patro) de Roy Lewis sub la franca titolo "Pourquoi j'ai mangé mon père? ".

Zoo estis kreita dum la Karkasona festivalo (*Festival de Carcassonne*) en 1963, poste reprezentita en Parizo en teatro "Théâtre National Populaire" estrita de Georges Wilson. En 1975, en la pariza "Théâtre de la Ville" denove ludiĝis la teatraĵo.

Li ankaŭ adaptis la teatraĵon Zoo por eksterlandaj scenoj (Berlino, GDR, en 1966).